la Stohastiko de la Telefona Trafiko, Speciale de la Komplete Alirebla Fasko), kun unupaĝaj resumoj en angla lingvo kaj Esperanto. Ni kore gratulas nian membron, d-ron Giltay, pro ĉi tiu rezulto, kiu kronas multjaran laboradon.

061.22 (ISAE).055.5„1949"

## ESTRARA RAPORTO PRI 1952

**La komitato** konsistis el jenaj 15 personoj: S. Alexandersson, Svedujo, F. J. Belinfante, Usono, E. D. Durrant, Britujo, M. Fréchet kaj F. Gaume, Francujo, M. Gjivoje, Jugoslavio, M. J. de Lange, Nederlando, I. Lapenna, Britujo, G. F. Makkink kaj W. P. Roelofs, Nederlando, H. Sirk, Aŭstrujo, C. Støp-Bowitz, Norvegujo, J. Toczyski, Polujo, A. A. M. Whitehead kaj K. Young, Britujo.

**La estraro** konsistis el: M. Fréchet, prezidanto, C. Støp—Bowitz kaj G. F. Makkink, vicprezidantoj, E. D. Durrant, ĝenerala sekretario, S. Alexandersson, sekretario-kasisto. Anstataŭantoj estis M. J. de Lange kaj H. Sirk, kaj revizoroj K. Young kaj A. A. M. Whitehead.

**Delegitoj.** Je la fino de la jaro ISAE havis delegitojn en 17 landoj kaj perantojn en 2 landoj.

**Membraro** je la fino de la jaro: Alĝerio 2, Argentino 2, Aŭstrujo 33, Belgujo 4, Brazilo 7, Britujo 82, Bulgarujo 1, Danujo 12, Finnlando 15, Francujo 79, Germanujo 27, Gvatemalo 2, Hispanujo 16, Italujo 10, Izraelo 1, Japanujo 29, Jugoslavio 5, Maroko 2, Nederlando 56, Norvegujo 15, Svedujo 13, Urugvajo 2, Usono 17, sume 432 membroj en 23 landoj.

**Landaj asocioj,** kolektive aliĝintaj al ISAE, ekzistis en Britujo, Francujo kaj Nederlando.

**La kongresa kunveno** okazis la 5an kaj la 7an de aŭgusto 1952 en la Universitato de Oslo, Norvegujo. Partoprenis 27 personoj el 12 landoj. La kunvenon prezidis s-ro C. Støp-Bowitz, vicprezidanto de ISAE.

**La sekretariejo,** prizorgita de s-ro S. Alexandersson, dum la jaro ricevis 148 kaj sendis 140 leterojn. Al delegitoj kaj komitatanoj estis sendataj 5 cirkuleroj.

**Scienca Revuo,** oficiala organo de ISAE, aperis per 3 numeroj de sia kvara volumo. Unu kajero enhavis duoblan numeron 2-3. (La kvara numero aperis en aprilo 1953.): Redaktoro estis d-ro W. P. Roelofs, kaj la revuon eldonis s-ro J. Muusses, Nederlando.

**Alvoko al scienculoj.** La 2a sekcio de la kongreso en Munkeno 1951 donis al ISAE la taskon kolekti subskribojn de la alvoko farita en la kongreso. Tiu tasko estis plenumita kun malgranda rezulto, kaj la subskriboj estis transdonataj al d-ro I. Lapenna antaŭ la kongreso en Oslo 1952.

**Prof. F. Egami,** japana delegito de ISAE, en julio partoprenis en Parizo konferencon de biologia kemio kiel japana delegito. Poste li vizitis la esperantokongreson en Oslo kaj vizitis Svedujon kaj Finnlandon por studoj. En ĉiuj landoj li renkontis membrojn de ISAE.



**La ekonomio de ISAE** pliboniĝis kaj ĝia kapitalo kreskis. Tamen ĝi estas parte ligita en orienteŭropaj landoj, el kiuj ni ne povas ricevi monon, speciale en Ĉeĥoslovakio. La japana delegito sukcesis transporti la tutan bonhavon de ISAE al Francujo. Ni povis plimalgrandigi la ŝuldon al la eldonisto.

### Spezoj 1952

| Enspezoj | sv.kr. | Elspezoj | sv.kr. |
|---|---|---|---|
| Saldo el 1951 | 8.62 | Francujo | 606.45 |
| Argentino | 12.30 | Muusses | 1551.25 |
| Aŭstrujo | 584.00 | Afranko | 64.25 |
| Belgujo | 27.80 | Papero, materialo | 36.45 |
| Brazilo | 83.60 | Libroj | 145.50 |
| Britujo | 75.00 | Kotizo al UEA | 14.50 |
| Finnlando | 116.50 | Diversaj elspezoj | 9.00 |
| Germanujo | 408.02 | Saldo al 1953 | 74.04 |
| Hispanujo | 84.00 | | |
| Italujo | 13.40 | | |
| Japanujo | 637.65 | | |
| Nederlando | 43.50 | | |
| Norvegujo | 148.90 | | |
| Portugalujo | 5.80 | | |
| Svedujo | 84.00 | | |
| UEA | 9.85 | | |
| Urugvajo | 14.50 | | |
| Usono | 144.00 | | |
| Sume sv.kr. | 2501.44 | Sume sv.kr. | 2501.44 |

### Bilanco 31.12.1952

| Bonhavoj | sv.kr. | | Ŝuldoj | sv.kr. | |
|---|---|---|---|---|---|
| Kaso | 74.04 | | Aŭstrujo | 340.00 | 1408.30 ŝil. |
| Argentino | 12.20 | 32 pes. | Brazilo | 4.75 | 17 kru. |
| Belgujo | 7.70 | 75 fr. | Finnlando | 1.70 | 76 mk. |
| Bulgarujo | 25.40 | 1410 lev. | Japanujo | 118.00 | 8240 jen. |
| Ĉeĥoslovakio | 243.00 | 2360 kr. | Jugoslavio | 5.90 | 340 din. |
| Danujo | 122.00 | 162.10 kr. | Meksikio | 12.10 | 19.50 pes. |
| Francujo | 910.00 | 61893 fr. | Muusses | 853.00 | 627.20 guld. |
| Germanujo | 89.00 | 72.40 mk. | Polujo | 44.50 | 34.50 zl. |
| Hispanujo | 7.80 | 60 pes. | Svedujo | 18.10 | 18.10 kr. |
| Italujo | 78.00 | 9400 lir. | Usono | 8.20 | 1.60 dol. |
| Norvegujo | 7.25 | 10 kr. | Kapitalo | 246.14 | |
| UEA | 14.50 | 1 £ | | | |
| EANA, Usono | 61.50 | 11.92 dol. | | | |
| Sume sv.kr. | 1652.39 | | Sume sv.kr. | 1652.39 | |

La estraro.